

# Novajaĵoj Tamtamas

横浜エスペラント会のエスペラント文会報

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

## Niaj Klasoj kaj Kursoj

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama, okazas jenaj klasoj.

\*Regulaj Klasoj en sabato: (1) Meza klaso gvidata de Doi Ĉieko; de junio oni lernas per kroata rakonto "Mirindaj Aventuroj de Metilernanto Hlapiĉ" . / (2) Klaso por legado de "Vivo de Lanti" / (3) Jokohama Salono / (4) Rudimenta kurso, gvidata de Fuse Kentarou, nun kun 5 lernantoj.

\*Regulaj Klasoj en merkredo: (1) Oni legas la verkon de Edmond Privat, "Karlo". / (2) Daŭriga kurso, per la posta parto de "Hanako lernas Esperanton".

## TIEL OKAZIS

### en Hama-Ronda Vespero

\*la 21-a de junio, 17h00-19h00, ĉe la regula kunvenejo

Pri interreto parolis s-ro Nanba Humiharu, la zorganto de la retejo de nia rondo. La parolo estis dividita en 2 partojn.

(1) Ĝenerale pri interreto, nome "TTT", klarigita en Esperanto, nome Tut-Tera Teksaĵo. Ĝia anglalingva mallongigo estas WWW, nome World Wide Web, kaj li desegne montris skemon de TTT laŭ aranea reto. Por verki TTT, oni bezonis koni teknikaĵojn, sed lastatempe, verkado fariĝis pli facila, kiel en Vikipedio aŭ en la retejo de nia rondo, utiliganta la sistemon jimdo.

(2) Pri la redaktado de nia retejo: La retejo (<http://hamarondo.jimdo.com/pri-hamarondo/>) estas modifebla de tiuj, kiuj konas pasvorton. Kaj ni lernis kiel fari tion, aldonante unu paĝon pri nia lernolibro.



- Eldonas Sibayama Zyun'iti ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti, Noriko
- Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
- Redaktejo: [tamtamo@googlegroups.com](mailto:tamtamo@googlegroups.com) ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>
- Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

## NIAJ PLANOJ

### Parol-Kurso de Wajik

\*la 26-a de julio, 15h00-17h00, ĉe la regula kunvenejo

En tiu tago, kelkaj el la rondanoj estos en la 99-a Universala Kongreso en Argentino. Do la restantaj personoj havos specialan parol-kurson de Wajik Iwanicki, nia rondano deveninta de Rusio.

### Ekspozicio Novtipa

\*de la 1-a ĝis la 3-a de septembro, ĉe la teretaĝa ekspoziciejo

Nia rondo faris ĉiujare ekspozicion pri Esperanto en tendo subĉiele. Sed ĉi-foja Ekspozicio estas de nova tipo, en galerio de la Centro por la gubernianoj de Kanagawa. Ni planas ekspozicii (1) fotojn pri niaj agadoj, i.a. internaciaj, (2) libroj en Esperanto, kaj (3) kiel kutime pri Esperanto.

### Prezento de Someraj Spertoj


\*la 6-a de septembro, 13h00-17h00, ĉe *Tikyuu-simin-plaza*

La rondanoj parolos, ofte kun fotoj projekciataj, pri la sperto en somero, aŭ eĉ en printempo, precipe kun Esperanta.

### Ekspozicio en tendo sub ĉielo

\*la 18-a kaj 19-a de oktobro, ĉe Parko "Zoo-nohana"

Kadre de la ekspozicio de la Jokohama Aŭtuna Internacia Festo 2014, ankaŭ nia rondo ekspozicios pri Esperanto.




---



---

## 95a Legokunsido

---



---

En la 7-a de junio okazis legokunsido kun 4 venintoj. La titolo de la legita libro estas "Rakonto de Ovoj".

### "Rakonto de ovoj" de J Marc Schmidt

Mizro Iwaya

Oni ne bezonas detale analizi la enhavon de mangao (bildstria rakonto). Oni devas, antaŭ ĉio, legi kaj ĝui la enhavon. Tiusence tiu ĉi libro estas sufiĉe ĝuinda. Antaŭ ĉio tiu ĉi estas mallonga kaj facila.

Aĉeti kaj legi ĝin mi rekomendas al vi.

La historio komenciĝas per la sceno de naskiĝo de la ovoj. Ili naskiĝis en kokinbredejo. Sed tuj post la komenco mi vidis ke unu el ili havis malbonan aspekton kaj la bredeja posedanto forĵetis ĝin al la hundo kiel furaĝon. Tute senpezan vivon! Tia komenco estas komika kaj tragedia. Tiamaniere daŭras la historio de la ovoj.

La antaŭkondiĉo de la rakonto estas

superreala: ovoj agadas kaj parolas. Sed se ni agnoskas tiun kondiĉon, ni povas tute nature sekvi la disvolviĝon de la historio. Ili amuzas sin kaj aktivis en la socio de homoj. Jes, ili estas nanoj en la romano de Arietti (japana fama bildfilmo angladevena). Ĉio estas iluzio, sed serioza iluzio. Precipe kiam Plumo, ĉefheroo de la rakonto, fariĝis ninĵao kaj subiris la ekzamenon de intervjuo de iu kompanio, ĝia sinteno estis tre serioza kaj des pli komika. Tiaj elementoj disŝutiĝas tra la tuta historio. Ĉi tie mi vidas ke la homo reprezentas realan mondon kaj la ovo reprezentas idealan mondon.

La lasta sceno, kie la restantaj ovoj iras foren direkte al la subiranta suno, montras la necertecon en la nuna mondo.


## Bildorakonto de karaj ovoj

SIBAYAMA Zyun'iti

Tiu ĉi rakonto 66-paĝa estas bildstria, kaj ĉefrolas ovalaj uloj kun brovoj, okuloj kaj buŝo, eventuale kun brakoj, sed sen kruroj --- fakte, ĉefrolas ovoj agantaj kaj parolantaj. Ili kunvivas kun la homa mondo, kaj ili sukcesas aĉetumi, kreditkarti, telefoni kaj komputilumi ... nome la supozata legantaro ne estas infanoj, sed plenkreskuloj, kiuj scias kreditkarti aŭ komputilumi.

Ili, la ovoj, estas malmulto el la miloj da ovoj naskitaj en kokinbredejo, volantaj fuĝi el la sorto esti kuirotaj kaj manĝotaj. Ili sukcesas liberiĝi, ĉar hazarde la mastrino-aĉetinto de la ovoj longe vojaĝas eksterlanden kun la fianĉo. La unua aventuro estas eliri el la breto de fridujo, sed ve, unu el la kamaradoj kraŝas albatinte sin al la planko. Alia el ili vundiĝas kaj la ŝelo havas krakon, sed ĝi multe aktivasi... Ĝenerale, la rakonto estas ridetiga, sed iel patosa, emocipleniga.

Mi supozas, ke ĝi estas la unua esperanta literaturaĵo kun "ninĵao", vorto trovebla nek en PIV



nek en la Esperanto-Japana Vortaro de JEI. En Esperantlingva Vikipedio, ĝi estas prezentita kiel "ninĵo", t.e. spiono en la tempo de feŭda Japanio. Ĝi estas pli fikcia homfiguro en la japana populara literaturo, kun nigra kostumo, ol la reale ekzistantaj spionoj. En tiu ĉi bildrakonto, unu el la ovoj entuziasmiĝas je televide spektata ninĵao, kaj kreditkarte aĉetas nigran kostumon kaj aliajn batalilojn. De loko al loko aperas japanlingvaĵo, kies esperanta ekvivalento estas montrita librofine.

Fakte, la rakonton kaj desegnis kaj verkis anglalingve aŭstraliano, ŝatanto de japanaj bildrakontoj kaj de ninĵaoj --- kaj loĝante en Japanio kiel esperantisto, li mem tradukis la rakonton Esperanten, kaj liaj samideanaj amikoj iniciatis eldoni ĝin Esperante. Tiel malofta estas la naskiĝo de la libro.

La Esperanta versio aperis en 2012, dum la originalo en 2004. Tion plej klare montras hejma komputilo, kun katod-radia ekrano. Hodiaŭ oni desegnas platkomputilon (tabuletan komputilon).

Cetere, interesis min onomatopeoj. Kelkaj devenas de Esperantaj radikoj: Krak!, Ĵet'. Sed multaj aliaj estas sendependaj: tunk!, svajp!, fomp! ktp.

La ilustraĵo estas prenita el "Rakonto de Ovoj"

## NOVAĴOJ JOKOHAMAJ

### ĈU ĈIUJ EN INFANVARTEJOJ?

Antaŭ unu jaro, en nia n-ro 283, ni raportis, ke en Jokohamo, ĉiuj enirdezirantoj en infanvartejoj povis vizitadi vartejon. Unu jaron poste, la urba aŭtoritato publikigis, ke 20 infanoj atendas vicon por vizitadi vartejon. En la financa jaro 2013, la urbo povis akcepti 2390 infanojn pli ol la antaŭa jaro, sed pli da dezirantoj aperis. Dank' al la novaĵo, multaj junaj paroj nove enmigris en Jokohamon.



## BELETRO

## Du malgrandaj mortoj (2)

Originale verkita de Vasilij Eroŝenko en la japana: 「二つの小さな死」

tradukita de Murata Kazuyo

(3)

La Morto kviete eniris la ĉambron de la riĉa sinjoreto. Sed neniu rimarkis tion. Ĉiuj ebriiĝis pro agrabla printempo, kaj dormetis en dolĉa horo. La kanario rakontis la legendon de fora tropika insulo, aŭditan de sia patro, al la amiko-hundo San-Bernarda. Aŭdante ĝin, la hundo konspiris kiel lerte batmortigi muŝojn ĝene kroĉiĝantajn per vosto sia.

La printempa vento sekrete flustris mioldolĉan fabelon al la belaj floroj en la florpoto. La sinjoreto rigardis la belajn rozkolorajn nubopecojn, kiuj malpeze flugis en la ĉielo, kvazaŭ flosus malpeza ŝipo glate sur blua maro. La Morto staris apud li kaj gravmiene alparolis.

“Hej, sinjoreto! Vi ne estu malatentema. Vi devas morti baldaŭ.”

La maldika vizaĝo de la sinjoreto pala kaj malvigla pro malsano, tuj fariĝis eĉ pli pala.

“Permesu min, bonvolu vivigi min pli longe, almenaŭ iom pli – ĝis la bela nuboj ne estos videblaj – ĝis la plena suno plene subeniras.”

“Ne diru kaprice. Mi mem ne elektas kaprice.”

“Sed, tamen iom pli. Ĝis la alaŭdo falos en la herbejon. Ĝis venos la fino de la kanto de la kanarioj. Mi petegas vin, iomete pli...”

“Vi do fordonos al mi la vivon de la floro, ĉu? Ĉiu vivo de la estuloj amataj de vi dependas de via mano. Anstataŭ plilongigi vian vivon ĝis la alaŭdo falos en la herbejon, fordonu al mi la vivon de la floro, ĉu?”

“Jes, mi donos al vi.”

“Ĉu ankaŭ la vivon de la kanario?”

“Jes.”

“Kaj la vivon de la hundo San-Bernarda?”

La sinjoreto malĝoje enrigardis la vizaĝon kovritan per la blanka vualo.

“Ne malfruiĝu por decidi. La Morto minace

proksimiĝas. Ĉu vi fordonos al mi la vivon de la hundo San-Bernarda? Ĉiu vivo de la estuloj amataj de vi dependas de via mano...”

“Jes mi fordonos ĝin al vi.”

“Ĉu la vivon de via amiko...?”

La sinjoreto fariĝis pli palega, kaj kun dolora mieno li enrigardis la vizaĝon de la Morto kovrita per la vualo.

“Se jes, mi plilongigos vian vivon ĝis la belaj ruĝetaj nubopecoj estos nevideblaj. Kaj ĝis la hela suno subeniros.”

“Jes, mi konsentas.”

La Morto kviete eliris el la ĉambro. Sed la sinjoreto alfiksita sian palan vizaĝon profunde en la kapkusenon, longe kaj longe ĝemploreĝis.

(4)

En la sekva tago okazis impona funebra ceremonio. Solena ĉerko kovrita per nigra silka tuko estis belege ornamita de multaj floroj, oferitaj de amikoj kaj parencoj. Sed la floroj jam ne estis vivaj. Multaj bele vestitaj amikoj malĝoje adiaŭis la ĉerkon. Ĝi estis la funebro de la riĉa sinjoreto.

Samtempe, okazis la funebro de la knabo de laboristo, kiu estis en la ĉambro kontraŭ tiu de la riĉa sinjoreto. Du tri servistoj metis la knaban korpon en keston, kaj portis ien for. Neniu adiaŭanto al ĝi estis trovebla tie.

Nur unu juna flegistino, surmetinta blankan vualon, akompanis la ĉerkon ĝis la pordego de la malsanulejo. Sub la vualo senĉese fluis belaj gutoj de larmoj. Fine la ĉerko fariĝis ne videbla, kaj la flegistino decideme diris,

“Ankaŭ mi iru. Ankaŭ mi devas iri. La vero estas tie.”

Kviete ŝi paŝis en la direkto al malriĉula kvartalo. Iu for-okulis ŝin kaj flustris,

“Ŝi aspektas la Morto. En blanka vualo, ŝajne ŝi kunportas arĝentan falĉilon en sia mano.”

(la fino)

